# Agado de
# Ĉeĥa Fervojista E-Asocio

# Renkontiĝo en Rožmitál p. Třemšínem

27.4.2024 okazis renkontiĝo en Rožmitál p. Třemšínem kiu okazis je kadro ekkomenco de somera trafikado Březnice-Rožmitál. Ni ankaŭ vizitis malgrandan fervojan muzeon kaj sekve ni trairis la urbo








# Jarkunveno okazis en Prago

7.5.2024  okazis jarkunveno de ĈeFEA en Prago. Je programo estis internaj aferoj, raportoj kaj prelego pri 75 IFEF kongreso en Strasbourg, prezentado de venonta kongreso (2025), kiu okazos en slovaka urbo Žilina. Ni ankaŭ diskutis pri nia aktiva agado dum kongreso de UEA en Brno (2025)



# La Eŭropa Esperanto kongreso





Je la kadro de la Eŭropa E-kongreso okazis ankaŭ kongreso de IFEF. Estis preparita bona kultura kaj faka programo, okazis multe da renkontiĝoj kaj kunvenoj. La fervojista organizo IFEF ankaŭ prizorgis siaj internaj aferoj. En la programo ne mankis du fakaj ekskursoj, unu al fervoja muzeo en Mulhause, dua al strasburga remizo kaj bontenejo de firmao SNCF. Por ni estis tre agrabla, ke niaj prelegoj vizitadis ankaŭ ne fervojistoj.





# Broŝuro de Verden projekto




Dum la kongreso estis ankaŭ prezentita fina broŝuro de projekto Verden-Daŭripova transporto

# 6.8.2024 Esperanto super la abismo

La renkontiĝo okazis en urbo Hranice de kie ni iris al Abismo de Hranice. Poste partoprenantoj atingis kioskon kie okazis agrabla babilado.





# 21.9-22.9.2024
# Nacia tago de fervojo en Česká Třebová

Ni planis uzis eblecon prezenti nian lingvon dum la Nacia tago de fervojo.  Bedaŭrinde la aranĝo estis nuligita.



# 15.10-17.10.
# Konferenco de ĈeFEA en Ramzová

15.10-17.10.2024 okazos konferenco de nia organizo ĈeFEA en pensiono Pacifik en Ramzová, kiu troviĝas je fervojlinio Zábřeh-Jeseník en montpasejo inter montaroj Jeseníky kaj Rychlebské hory (750m.s.m). La aranĝo estas malfermita al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri nia agado. Vi povas partopreni aŭ nur viziti nin.



# Klubejo en Choceň
# nia deponejo kaj arĥivo


La klubejo estas nun plene ekipita per tabloj, seĝoj. Ni aĉetis tri ŝrankojn por nia arĥivo kaj projekciilon.





Dum la tuta jaro daŭris laboro de niaj mebroj. Ili aktive partoprenis ĉe diversaj E-renkotiĝoj, helpis traduki aŭ krei artikolojn ne nur por fervojista revuo Internacia fervojisto. Ni preparadis prelegojn, ekskursojn.

Je internacia agado estas plej aktivaj L. Kovář- ŝefredaktoro de Internacia fervojisto kaj J. Matuška, gvidanto de Fake-aplika sekcio, kiu zorgas pri faka agado de IFEF (prelegoj, fakaj ekskursoj, eldonado de Fervoj fakaj kajeroj)



8.11-11.11.2024 Konferenco de GEFA en Bad Elster. La loko troviĝas proksime de nia limo kaj parto de la programo okazos en Františkovy lázně. La parto de la programo estas malfermita por ĉiuj interesiĝantoj.

28.11-1.12.2024 Virtuala kongreso. Kiel kutime, ni prezentos nian laboron.

30.4-4.5.2025 76-a kongreso de IFEF en Žilina (Slovakio) kien ni invitas ankaŭ vin!

Do ni ankaŭ supozas niaj aktivan partoprenon dum UK en Brno

# Kio atendas nin?



Ĝis revido ĉe niaj aŭ aliaj aranĝoj!